

# La problemo de traduko de la etnaj realaĵoj en la beletraj tekstoj

**Nina Danylyuk**



## *Aktualeco de la temo*

- La temo de la prelego estas *aktuala*, ĉar en la nuntempa lingvistiko oni aktive pristudas la leksikon kun la kultura semantika komponento kadre de etnolingvistiko, lingvokulturologio, kognitia lingvistiko, teorio de tradukado. Ĉi tiuj leksemoj estas rigardataj ne nur kiel apartaj lingvaj unuoj, sed en la strukturo de specifika monda lingvobildo de iu popolo aŭ socia grupo.



## *Fonta bazo de la lingvokultura leksiko*

- E-tradukoj de ukrainaj popolaj kantoj;
  - la verkoj de T. Shevĉenko, Lesja Ukrainka, I. Franko, J. Hucalo, M. Voronij k.a.;
- priskriboj de la etnaj popolaj festoj k.t.p. en la revuoj “Ukraina stelo”, “Voĉo el Ukrainio”, “Helianto” k.a.



## La termino “*lingvokulturemo*”

- estas uzata en la senco  
“leksiko kun kulturologia signifo”  
(ne nur unuopaj leksemoj, sed sintaksaj unuoj,  
frazologiaj esprimoj, kiuj havas kulturologiajn  
semaojn).



## *Traduki* signifas

- “transigi iun tekston aŭ konversacion de iu lingvo en alian, anstataŭigante vortojn kaj esprimojn de la unua lingvo per samsencaj vortoj aŭ esprimoj de la alia”

(Plena vortaro de Esperanto kun Suplemento (1964), Paris: 477)



L. Zamenhof en 1988 j. skribis:

- “...Por ke lingvo eble pli rapide fortiĝu kaj riĉiĝu, oni devas eldoni kiel eble pli multe da verkoj en la lingvo internacia, originalaj kaj tradukitaj”

(Zamenhof, Ludoviko L. (1929): Originala verkaro, J. Dietterle (kol.), Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn: 39)



## M. Malovec substrekis:

- „La tradukanto devas memori, ke li tradukas ne nur inter diferencaj lingvoj, sed ankaŭ inter diferencaj kulturoj. Ĉiu teksto vekas en la leganto asociojn, kiuj troviĝas kvazaŭ malantaŭ la vortoj ekster la teksto, kaj tiuj eksterlingvaj asocioj diferencas laŭ kulturoj historiaj aŭ geografiaj” (Malovec, Miroslav (2000): Gramatiko de Esperanto. Praha: Kara-Pech: 131).



## 2 grupoj de la lingvokulturemoj:

- 1) vortoj, kiuj ne havas ekvivalentojn en alia lingvo kaj kulturo (ekz., *kimono* kiel nacia vestaĵo en la japana lingvo, *jurto* – en la lingvoj de nordaj popoloj k.t.p.);
- 2) vortoj, kiuj havas ekvivalentojn, sed diferenciĝas per semantika strukturo (ekz., *betulo* en la rusa lingvo estas ne nur arbo kun blanka trunko, sed simbolo de bela knabino kaj de Rusio kiel lando; *bovo* estas kutima besto por multaj, sed por hispanoj estas simbolo de la korido.





## Ukrainaj lingvokulturemoj:

- ***pano*** (ukr. *hlib*) – estas simbolo de riĉeco, gastemo, feliĉo; bele ornamitan panon ukrainoj donas al gastoj, preparas por edziĝfestoj, Pasko, naskiĝtagoj, por malproksima vojo;
- ***barĉo*** (ukr. *borŝĉ*) – supo, kuirita el ruĝa beto, brasiko kaj aliaj pli ol 20 komponentoj;
- ***brodita bluzo*** aŭ ***ĉemizo*** (ukr. *viŝivanka*) – parto de nacia kostumo; ***brodita viŝilo*** (ukr. *viŝitij ruŝnik*) – memfarita ornamaĵo el blanka brodita teksaĵo por la loĝejo, ankaŭ havas funkcion de gardanta talismano k.t.p.

# Korovaj






# Gejunuloj en la naciaj kostumoj





- Fortan, kuraĝan, bravan viron ukrainoj nomas per vorto *kozak*.
- Tio ĉi estas historia nomo de batalanto por libero de Ukrainio en 13-17 j.c.





## Landnomo *Ukrainio* (*Ukrainujo*) kaj ĝiaj variantoj

- *Ukrainio, Ukrainujo, Ukrajnio, Ukrajno, Ukraino, Ukraini', tero Ukraina, lando Ukrainia.*

*La 24-an de aŭgusto estis deklarita la sendependeco de Ukrainio*  
(trad. V.Pacjurko, US, 1994/ 1: 6); *Dolĉega Ukrajno, karega patrin'!*  
(trad. A.Koba, LUkr: 14); *Ukrajnon amas vi, Do gajnas la honoron...* (trad. M. Bronŝtejn, IF: 30);

E-traduko de la ukraina nacia himno: *Ne jam mortis Ukrajnio, nek liber', nek gloro. Kaj ankoraŭ al ni, fratoj, venos sortfavoro*  
(trad. V.Jaskovec kaj V.Pacjurko, US, 1991/ 4: 3).

Esperantigita teksto de la “Preĝo”: *Di', Ununura, Majesta, Gardu Patrujon por ni. De la libero radiojn Sendu al Ukraini'* (US, 1991/1: 2).



# Ukrainio kun la najbaraj landoj





## Nomo de la ĉefurbo *Kijivo*

- La variantoj: *Kievo*, *Kyjivo*, *Kijivo*

*La ĉefurbo de Ukrainio estas Kyjiv (esperantigita formo – Kievo), kiu situas sur la bordo de la rivero Dnipro (trad. V.Pacjurko, US, 1994/ 1: 6).*

- La formo *Kijivo* estas nun disvastigita en la ukraina E-literaturo

**La plej malnova katedralo  
nome de la sancta Sofio en Kijivo (XI j.c.)**







## Nomo de la rivero *Dnipro*

- *La variantoj: Dnipro, Dnepro*

*Brulegas, ĝemas Dnepro vasta* (trad. B.Berin);  
*Bruegas Dnipro, grandrivero* (trad. E.Miĥalski) (Taras Ŝevĉenko (1990): Dumoj miaj, kantoj miaj (30 poemoj, tradukitaj en Esperaton, kaj 21 ties variantoj), V. Pacjurko (komp. kaj red.), Kijivo: Literaturtradukista sekcio de UkrEA.TS: 5-6).

# Apud la rivero Dnipro





## Historia nomo de la ŝtato *Kijiva Rusjo*

- variantojn de la landnomo: *Kieva Rusjo*, *Kieva Rutenio*, *Kievio*, *Kyevio*, *Kyjiva Rusjo*, *Kijiva Rusjo*, *Rusjo*

*Kieva Rusjo* (*Kievio*, ukraïne “*Kyjivska Rusj*”) estis la unua potenca ŝtato de l’ukraina popolo (trad. Poĉopo (US 1995/ 1: 8))




# Kijiva Rusjo (IX – XIII j.c.)



## *Taras Shevchenko* (1814–1861)

- granda ukraina verkisto kaj pentristo, la fondinto de nova ukraina literaturo kaj lingvo, la simbolo de libero





## La “Kobzisto”

- la plej populara verkaro “Kobzisto” (1841)
- E-libroj “Dumoj miaj, kantoj miaj” (1990, 2014),
- lingvokulturemoj: *Ukrainio, Dnipro, kozako, patrino, kobzisto, banduro, dumo, libero, sorto k.a.*;
- ***Studu fremdan, sed ne forgesu la propran: Ekzistas la sorto – sed kiu ĝin konas? Ekzistas libero – Ĝin kiu disponas?*** (trad. A.Grabowski TS: 17).



# La kobzisto





## Nomoj de la tradiciaj popolaj festoj

- *Kristnasko-Kolada, Malnova Nova jaro* (Nova jaro laŭ malnova ortodoksa stilo), *Pasko, Sankta Triuno* (Verdaj festoj), *Festo de Sankta Johano* (*Festo de Ivan Kupalo*)
- La realaĵoj: *diduĥ, kutja, vertepo, koladko, paska pano, pisanko, Kupalo, Mareno, Kolada, Daĵboh* k.a.):  
„Kristnasko kuniĝis kun pagana (antaŭkristanisma) festo de Kolada, la tutslava diino de la ĉielo, patrino de la Suno, edzino de Daĵboh (la dio de la suno, lumo kaj bono), por kiu niaj prauloj celebris la plej mallongan en la jaro tagon kaj la renaskiĝkomencon de la sunforto“  
(US 1991/1: 5)



## *Festo de Ivan Kupalo*

- *Tio estas mirinda celebrado de du sanktuloj – la kristana **Johano** (aŭ ukraine Ivan) kaj de **Kupalo** – la pagana dio de l’teraj fruktoj... (US 1995/1: 20).*



# Muzeo de Pisanko en u.Kolomija





# Orest Kuzjma- Tagoj, Kolomeo, 2018





## Konkludoj

- La manieroj por transdoni la ukrainajn lingvokulturemojn en E-tradukoj:
- 1) **kutimaj vortoj, fiksitaj en E-vortaroj** (ekz.: *akvofero*); 2) **paŭsoj** (ekz. *Digrompanto*); 3) **transliteracio** (ekz.: *Ukrajno, rusalko*); 4) **kuntekstaj komentoj** (aldona informo de la tradukisto); 5) **postnotoj (piednotoj) k.a.**



## **Mankoj:**

- 1) ne ĉiam tradukistoj donas bezonatajn kulturologiajn informojn;
- 2) estas uzataj multe da variantoj de geografiaj nomoj kaj familnomoj de famuloj.
- Por adekvate transdoni kulturenhan leksikon necesas ellabori unuopajn postulojn.